



la informilo

ISSN:0291-6037

informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:

KULTURA ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIIO

FEDERATION CULTURELLE FRANCE-EST POUR L'ESPERANTO

MAISON DES JEUNES ET DE LA CULTURE Ph.DESFORGES

27, Rue de la République, F-54000 NANCY

PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

nouvelle série
trimestriel
2^e trimestre 1985
n° 50



abonnement

un an: 25 F

jara abono
por eksterlando:

36FF aŭ 12 R.Koj

ANTO - FLASH... ESPERANTO - FLASH... ESPERANTO



photo et extrait d'article de L'EST REPUBLICAIN du 5 mai 1985. Sur la photo, de gauche à droite, E.LUDWIG, président de la Fédération, J.L. CLAUDEL, du Comité, N. ROUX, secrétaire, R. DURAND de l'équipe d'accueil, J.P. COLNOT, vice-président.

**Congrès régional « Espéranto » :
un tremplin pour les Assises
Nationales de 86 à Gérardmer**

20 ET 21 AVRIL 1985

"Durant un week-end, l'Ecole Normale d'EPINAL vient d'accueillir le 44ème Congrès de la Fédération France-Est pour l'Espéranto, regroupant les membres des clubs de 8 départements. A l'époque où les relations internationales se multiplient sous tous les aspects, il est bien agréable de pouvoir trouver de Tokyo à Moscou, de Brasilia à New-York, des amis dont aucune barrière de langue ne nous sépare, et cela grâce à l'Espéranto qui s'apprend 5 à 10 fois plus vite que toute autre langue... Les participants ont noté avec plaisir la progression du nombre des Universités qui dispensent maintenant un enseignement officiel de l'Espéranto (110 en 1984 contre 51 en 1980)... La Chine fait un effort considérable en faveur de cet apprentissage*...

Lors de la réception officielle qui a clôturé ce Congrès, différentes personnalités vosgiennes ont tenu à encourager ce mouvement. Elles ont été informées de l'organisation en 1986 à GERARDMER du Congrès National de l'UNION FRANCAISE pour L'ESPERANTO qui comprend 12 filiales régionales. L'équipe vosgienne autour de Mme BERNARDIN et MM. DURAND et COLIN va s'y consacrer dès aujourd'hui.

Ce Congrès fut l'occasion pour tous les participants de visiter l'Imagerie PELLERIN qui a elle aussi fait un effort particulier en publiant plusieurs planches en Espéranto qui ont été vivement appréciées."

* NB: le Congrès Universel de U.E.A aura lieu à PEKIN en 1986.

L'ESPERANTO ET LA COMMUNAUTE ECONOMIQUE EUROPEENNE

Un excellent article paru dans la revue interne de la COMMUNAUTE ECONOMIQUE EUROPEENNE (CCE) sous la plume de G. Pirlot met l'accent sur les avantages indéniables que l'introduction de l'espéranto dans les programmes et dans les instances officielles de la CCE ne manquerait pas d'apporter sur différents plans. Muni chacun d'un instrument d'intercommunication, les élèves pourraient alors s'adonner en plus à l'apprentissage des langues "minoritaires" que sont par exemple le danois, le grec, l'italien ou le néerlandais...*"Pour l'avoir vécu à maintes reprises, je peux vous assurer que l'espéranto engendre une meilleure ambiance internationale entre des personnes de différents pays européens; chacun doit alors faire l'effort de s'exprimer dans une langue qui n'est pas la sienne, dans le respect de tous les participants"*.

Rappelons qu'un groupe de députés du Parlement Européen ambitionne de soutenir la promotion de l'espéranto dans le fonctionnement de la CEE. Il comprend actuellement 37 membres de 7 nations: G-B(18), Belgique (7), Italie (4), RFA (3), Pays-Bas (3), Irlande (1), et France (1).

PLEIN SUCCES POUR LA "SEMAINE DE NICE"

Il s'agit là très certainement d'une réussite "haut de gamme" dans le domaine de l'utilisation sans restriction de la langue internationale. Dans un des plus beaux décors de la Côte d'Azur, les 108 participants de 9 pays (USA et Finlande compris!) ont eu tout loisir d'apprécier le programme culturel et attrayant harmonieusement agencé par M. LLORENS et sa petite équipe, du 30 mars au 6 avril. Cours à niveaux multiples, excursions variées avec guides espérantistes, soirées à contenu éclectique: cabaret, diaporamas, concours -"les chiffres et les lettres" en espéranto ont mobilisé la quasi-totalité des participants!- ont contribué au succès de cette deuxième rencontre internationale appelée sans doute à devenir traditionnelle.

L'ESPERANTO A L'UNIVERSITE

A partir d'octobre prochain une expérience d'enseignement de la langue internationale d'une durée de 3 années se déroulera à l'Institut des Langues dans le cadre de l'Université Libre Flamande à Bruxelles. Dans une autre ville belge, Tienen, un cours d'espéranto fonctionnera à l'Institut technique provincial, cours sanctionné par l'attribution d'un diplôme officiel.

A San Francisco, pour la 16ème année consécutive, les cours multi-niveaux de l'Université d'Eté se dérouleront du 1er au 19 juillet, cours agrémentés de réceptions, visites et excursions.

Au Brésil, les professeurs de langues de l'Université Fédérale de PARANA ont participé à un séminaire d'interlinguistique où l'E° a tenu une place importante.

* UN GUIDE TOURISTIQUE ORIGINAL

Sur l'initiative de l'Union Française pour l'Espéranto, il rassemblera, sous forme de fiches, une documentation variée sur les villes et les sites touristiques de notre pays, dans l'optique de la visite d'espérantistes étrangers appelés à le parcourir. C'est pourquoi un chapitre sera dédié aux structures d'accueil spécifiques et sur les activités des clubs locaux d'espéranto, renseignements qui ne manqueront pas de faciliter le séjour des touristes parlant la langue internationale. Les éventuels collaborateurs de ce fichier-voyages d'un genre nouveau peuvent d'ores et déjà contacter le rédacteur en chef, Mme Cl. NOURMONT, 2, Om Klappchen, L-5682 Luxembourg.

* UNE RENCONTRE FRANCO-ALLEMANDE DE L'AMITIE

La ville de Rastatt a accueilli du 21 au 31 mars 130 espérantistes d'Allemagne de France et d'autres pays pour un week-end particulièrement riche où culture et détente ont permis à chacun de pratiquer l'espéranto dans une ambiance extrêmement amicale. 30 jeunes gens de 6 nationalités différentes ont eu, à l'intérieur de ce forum, leurs propres activités: débats informatifs, rallye cyclo-pédestre, soirée dansante... Des réunions particulières ont également regroupé les participants selon leurs affinités: Amis de la Nature, Educateurs, Catholiques, etc...

* LES RENDEZ-VOUS DE TROYES

La quatrième rencontre espérantiste de Mesnil-St-Père a réuni du 15 au 18 mars plus de 70 participants de 5 nations. Cours de différents degrés, conférences, présentation de films, cabaret étaient offerts aux stagiaires qui ont pu bénéficier de la présence active d'espérantistes éminents de France, Suisse et Italie.

* LE TISSAGE EN POLOGNE... UN ART MILLENAIRE

Tel est le thème choisi par Tamara ROSZAK de Lodz pour faire connaître son pays au cours de son prochain voyage à travers la France, programmé pour octobre prochain. De Paris à Luxembourg, en passant par 18 autres villes où elle sera l'hôte des clubs espérantistes, T. Roszak, peintre de profession, fera connaître, démonstration à l'appui, une activité artistique très répandue en Pologne. Ce cycle de présentations à vocation culturelle s'insère dans toute une série de même type, organisée par l'UFE, depuis de nombreuses années déjà.

* LE 3ÈME FESTIVAL DE THEATRE EN ESPERANTO

Il s'est déroulé du 22 au 27 mars 1985 à Budapest, dans le cadre du Festival de Printemps qui attire dans la capitale hongroise de nombreuses troupes, artistes et spectateurs du monde entier. C'est ainsi qu'entre autres présentations en langue internationale, on a pu apprécier la nouvelle oeuvre de Janos Elem: "Betonterapio", la tragi-comédie de Laszlo Tabi: "La Dame de l'inévitable..." et le monologue de Franz Kafka: "Lettre à l'Académie". Le Théâtre Espérantiste Bulgare était l'hôte d'honneur de ce festival culturel de grande qualité.



COURS INTERNATIONAUX SIMULTANES D'ESPERANTO

Trois villes participeront à ces cours simultanés dont l'organisation a été confiée au professeur Peter-Ruetschi: LUCERNE (Suisse), WESTON super MARE (Angleterre) et STUTTGART (R.F.A.). Les élèves seront mis en correspondance dès la quatrième leçon et des rencontres inter-cités auront lieu dès la fin du cours. Des messages amicaux d'encouragement -en espéranto!- peuvent être envoyés à l'adresse suivante: VOLKSHOCHSCHULE, E°-Rondo, Hölderlinstr. 54, D-7000 STUTTGART.




UN PERIPLE MONDIAL PEU ORDINAIRE

On sait que l'un des avantages primordiaux de l'espéranto est de permettre à ses pratiquants de bénéficier d'une infrastructure d'accueil unique et sans frontières. Renouvelant et améliorant un exploit effectué il y a quelques années, un couple japonais, Tsutomu Suganami et Yashiko Unno vient de parcourir ...34 pays (Asie, Europe, Afrique et Australie) en un peu moins d'une année et ce... le plus souvent à bicyclette!

★★★★ plus rapide... plus efficace ...



NOTRE NOUVEAU COURS D'ESPERANTO PAR CORRESPONDANCE



- ★ un matériel MODERNE
- ★ une technique EPROUVEE
- ★ un réseau d'animateurs COMPETENTS
- ★ un savoir IMMEDIATEMENT opérationnel

C'EST LE COURS "QUATRE ÉTOILES"!

Tous renseignements à l'adresse suivante:

COURS D'ESPERANTO
PAR CORRESPONDANCE
M.J.C. Ph. Desforges
27, Rue de la République
54000 NANCY

Vous découvrirez ci-contre l'une des 6 nouvelles cartes de propagande informative éditées par l'UNION FRANÇAISE pour l'ESPERANTO. Elle appartient à une série de 6, illustrées différemment. Le thème qui retiendra le plus l'attention du public bénéficiera d'un tirage exceptionnel, format affiche.

Au dos, chaque carte porte l'adresse de l'UFE et le n° de téléphone du service spécifique "information" du siège.

la série (6) : 20F franco

en vente: U.F.E. = 4bis, Rue de la Cerisaie, 75004 PARIS
CCP 855 35 D PARIS



22^{ème} stage pratique d'espéranto parlé



un peu de
patience...
demain...
conversation
à quatre!!!



Samedi 26 et
Dimanche 27
octobre 1985

MAISON
DE L'ASNEE

Rue de Laxou
54600

VILLERS-lès-NANCY

... MAIS DÈS CE SOIR... SAMEDI...
UNE EXPLORATION FANTASTIQUE!



tél.: (8)327 61 05
uniquement pendant
la durée du stage.

Une fois de plus, nous organisons sous l'égide de la Fédération FRANCE-EST pour l'ESPERANTO un stage qui permet de commencer l'étude de la langue internationale ou de parfaire ses connaissances. La Fédération Culturelle France-Est pour l'Espéranto est membre de l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO, agréée par le Ministère de l'Education Nationale. Le succès de ces rencontres culturelles est toujours très grand.

Nous invitons tous les espérantistes de notre région, des régions et pays voisins (Allemagne, Belgique, Luxembourg) à notre stage qui aura lieu à la "MAISON DE L'ASNEE" à VILLERS-lès-NANCY, les samedi 26 et dimanche 27 octobre 1985.

CINQ COURS A NIVEAUX MULTIPLES!!

COURS A1 Si vous n'avez aucune notion d'espéranto. Livre utilisé: "METODO 10".
Animateur: E. LUDWIG

COURS A2 Si vous êtes déjà à mi-chemin d'un cours élémentaire ou si vous avez participé à un stage.
Livre utilisé: "METODO 11".
Animateur: J.-P. COLNOT

COURS B Si vous êtes parvenu au terme de votre apprentissage élémentaire.
Livre utilisé: "METODO 12".
Animateur: J.-L. CLAUDEL...
... et son accordéon!

COURS C ..."krokodilo malpermesata"...
Pour peaufiner vos connaissances.
Livre utilisé: "Lasu min paroli plu!"
Animateur: P. DENIS (Cl. PIRON)

COURS D Sur les pas d'un grand auteur.
Livre utilisé: "Vortoj de Andreo CSEH"
Animateur: E. BORSBOOM (Pays-Bas)

*Veillez détacher (ou recopier) le
bulletin d'adhésion ci-dessous et
le faire parvenir avant le 13 octobre 1985
à l'adresse suivante:*

Mme Madeleine ROUX
9, square Aristide BRIAND
F-54500 VANDOEUVRE

Les stagiaires français voudront bien y joindre un premier chèque d'inscription (du montant -ou d'une partie du montant- de l'adhésion), chèque postal ou bancaire, au nom de Mme ROUX. Les stagiaires étrangers s'acquitteront de leur dû sur place.

22ème stage d'espéranto - 26/27 octobre 1985

BULLETIN Veuillez cocher les cases concernées
- d'adhésion -

NOM et PRENOM:

ADRESSE:

Je réserve lit(s) dans une chambre

à 1 lit à 2 lits nuit supplém. éventuelle le vendredi

Je fournirai mes draps Je n'apporterai pas mes draps

Je réserve des repas, le samedi soir pour personne(s)

le dimanche à midi pour personne(s)

T.S.V.P. !

... de départ:

par train par voiture

PROGRAMME

SAMEDI 26 OCTOBRE 1985

- = de 13h à 14h15: arrivée et accueil des participants
- = 15h: 1er cours (chaque cours dure 45 mn - pause de 15 mn)
- = 18h30: service de librairie
- = 19h: repas pris en commun

... ET À 20H30, HUGO RÖLLINGER, ESPÉRANTISTE EXPLORATEUR, NOUS INVITERA À LE SUIVRE DANS LA MYSTÉRIEUSE "VALLEE DES ROIS", À LA DÉCOUVERTE DES TRÉSORS FABULEUX DE TOUT ANKHAMON!


UN REPORTAGE HAUT EN COULEURS, UNIQUE ET FASCINANT!

DIMANCHE 27 OCTOBRE

- = de 8h à 8h30: petit déjeuner
- = 8h45: reprise des cours
- = 11h45: service de librairie
conversations amicales
- = 12h30: repas en commun
- = 14h: réunion du Comité de la Fédération



"... Novembre 1922. Howard CARTER franchit successivement, le cœur battant, les trois portes scellées qui lui révélèrent le trésor le plus fantastique que ses yeux aient jamais vu... et c'est enfin la chambre sépulcrale aux trois cercueils gigognes en or. Carter, subjugué, fait ouvrir le sarcophage de bois doré... qui en contient un autre, et voici le troisième... en or massif! Quelques instants plus tard, le corps embaumé de TOUT ANKHAMON revoit la lumière... après plus de 3000 années!"



EXAMENS: le dimanche matin pour les élèves volontaires des cours B, C et D

FRAIS DE PARTICIPATION

INSCRIPTION: 50F + 35F (abonnement à LA INFORMILO) pour les non-membres de la Fédération. 50F pour les abonnés, les membres de la Fédération et leur famille. 40F pour les 12 à 18 ans. Gratuité au-dessous de 12 ans.

REPAS: samedi soir, 42F - dimanche midi, 47F. (sans les boissons)

CHAMBRE: (et petit déjeuner pour une personne) = avec les draps: 62F. Sans...: 46F.

SERVICE DE LIBRAIRIE

Tout espérantiste devrait acheter au moins un livre par an. Pour éviter des frais de port, un bon conseil: passez commande avant le stage; vos livres vous attendront avec joie à votre arrivée.

Les manuels destinés à votre stage (à cocher sur le bulletin d'inscription) seront à votre disposition sur place et payés de même

Je m'inscris au cours A1 A2 B C D

Je suis candidat à l'examen "Atesto pri lernado"

"Atesto pri praktika lernado"

"Atesto pri kapableco" (écrit)

Je suis abonné à "LA INFORMILO" Je ne suis pas abonné à "LA INFORMILO"

Je réserve le livre METODO 10 METODO 11 METODO 12 LASU MIN PAROLI PLU



22^o praktika staĝo de parolata esperanto



7

26an kaj 27an de oktobro 1985



"MAISON DE L'ASNEE", Rue de Laxou,
F-54600 VILLERS-lès-NANCY



nur
dumstaĝe!

83 27 61 05

Denove, sub la ŝildo de la ORIENT-FRANCA KULTURA ESPERANTO-FEDERACIO, membro de U.F.E., agnoskita de "MINISTERE DE L'EDUCATION NATIONALE", la NANCJA GRUPO organizas tiun staĝon. Tiel, ĉiuj gelernantoj, plej parte izolitaj en sia vilaĝo aŭ urbeto, povas renkontiĝi kaj ĉiuj havas sekve la eblecon praktiki Esperanton.

Samtempe ni invitas ĉiujn esperantistojn -eĉ komencantojn!- en najbaraj regionoj de Francio kaj en Germanio, Belgio, Luksemburgo, Nederlando, Svisio kaj Britio veni por praktike kaj konkrete uzi kune la Internacian Lingvon.

ESTOS 5 KURSOJ

KURSO A1 Por tuj komencontoj
Libro: "METODO 10"
Gvidanto: E. LUDWIG

KURSO C Por lingvoposedantoj
Libro: "Lasu min paroli plu!"
Gvidanto: P. DENIS

kiuj atingis la duonon de la la-grada kurso aŭ partoprenis unu staĝon.

KURSO A2 Por ĵus komencintoj
Libro: "METODO 11"
Gvidanto: J.-P. COLNOT

KURSO D Por spertaj esperantistoj
Libro: "Vortoj de Andreo CSEH"
Gvidanto: E. BORSBOOM
(Nederlandano)

finlernis la la-gradan kurson.

KURSO B por tiuj, kiuj
Libro: "METODO 12"
gvidanto: J.-L. CLAUDEL (kun sia akordiono!)



Bonvolu detranĉi aŭ rekopii la ĉi-suban slipon kaj sendi ĝin antaŭ la 13a de oktobro al

S-in^o Madeleine ROUX
9, Square Aristide BRIAND
F-54500 VANDOEUVRE




83 55 53 36

Francoj aldonu samtempe poŝt- aŭ banko-ĉekon (aliĝ-kotizo aŭ almenaŭ parto de la aliĝ-kotizo) je la nomo de S-in^o Madeleine ROUX.
Eksterlandanoj prefere pagu surloke.

22a staĝo de
parolata ESPERANTO

ALIĜILO



bonvolu krucumi
laŭoportune en la
etaĵ kvadratoj

26/10 kaj 27/10/1985

Sr^o S-in^o F-in^o

NOMBRO DE PERSONOJ:

NOMO:

ANTAŬNOMO:

ADRESO:

Tago kaj horo de alveno:

de foriro:

trajne
aŭtomobile

Mi rezervas lito(j)n en ĉambro kun 1 aŭ 2 lito(j)

Suplementa nokto (eventuale) por la vendredo 25a

Mi alportos miajn lit-tukojn Mi ne alportos miajn lit-tukojn

Mi rezervas manĝojn: = sabate vespere por persono(j)
= dimanĉe tagmeze por persono(j) bonvolu vidi dorse!

PROGRAMO

SABATON, LA 26AN DE OKTOBRO

- = ĝis la 14h45: alveno de la partoprenantoj
- = de la 15h ĝis la 18h30: kursoj (45 minutoj + 15 minutoj por paŭzo)
- = 18h30: libro-servo
- = 19h: komuna vespermanĝo

DIMANĈON, LA 27AN

- = de la 8h ĝis la 8h30: matenmanĝo
- = de la 9h ĝis la 11h45: kursoj
- = 12h45: komuna tagmanĝo
- = 14h: komitat-kunveno

... SABATE JE LA 20H30, HUGO RÖLLINGER (F.R.G.) GVIDOS NIN ĜIS LA FABELA TREZORO DE TUT-ANH-AMUN!... MIRINDA DIAPORAMO POR FABELA ESPLORADO!

"... Diapozitivo-vesperon vi verŝajne ofte ĉeestis ĉe amikoj viaj. Estu honesta: foje vi ankaŭ iom enuis! Jen kio certe ne okazos, dum la prezentado, kiun ni proponas al vi dum tiu aŭtuna staĝo en VILLERS-lès-NANCY, ĉar lotis ŝakulo, kiu turneas tra Esperantujo de pluraj jaroj. Jen okazo ĝui profesinivelajn bildojn kaj altnivelan Esperanton!..."

E. Ludwig

KOSTOJ Aliĝkotiĝo: 50FF + 35FF (abono al LA INFORMILO) por ne-federacianoj kaj ne-abonantoj.
50FF por federacianoj, abonantoj al LA INFORMILO kaj familianoj.
Senpage por geknaboj sub 12 jaroj.

Manĝoj: Vespermanĝo: 42FF. Tagmanĝo: 47FF.


Tranoktado (kun matenmanĝo): Se vi alportos viajn littukojn: 46FF.

Sen littukoj propraj: 62FF.

VARMA AKVO EN ĈIU ĈAMBRO.

GRAVA ATENTIGO!

Pri tiu staĝo, la 22a organizata sub la ŝildo de nia KULTURA FEDERACIO, respondecas nur la NANCIA Grupo. Ĉiuj eventualaj plu-informoj pri la staĝo estos, se necese, senditaj nur de S-in^o ROUX.



Mi partoprenos en kurso A1 A2 B C D

Mi kandidatiĝas por la jenaj ekzamenoj: "Atesto pri lernado"

(la ekzamenoj okazos dimanĉe matene) "Atesto pri praktika lernado"

"Atesto pri kapableco (skribe)"

Ĉu vi abonas "LA INFORMILO-n"? jes ne

Mi mendas la jena(j)n libro(j)n: METODO 10 METODO 11 METODO 12

"Lasu min paroli plu!" (C.PIRON)

ANGULO DE LA PREZIDANTO

Reelektite dum la Federacia Kongreso en EPINAL, mi provos, helpe de la skipo, kiu jam plej sindoneme kunagadas de du jaroj, daŭrigi la entreprenitan laboron por diskonigi Esperanton.

Laiŭ la statutoj, la Federacio estas membro de U.F.E. (Unuiĝo Franca por Esperanto) kaj tra ĝi, membro de U.E.A. (Universala Esperanto-Asocio). Ni memorigu, ke U.F.E. estas la nura asocio agnoskita de la Ministerio pri Edukado, kaj ke U.E.A. estas la sola asocio en konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.K.O.

Kiu informiĝis pri la laboro de UFE en la lastaj jaroj, devas konfesi, ke ĝi estas impona. Ĉiuj rezultoj atingitaj ŝuldiĝas al laboro de skipo kaj al la malavara subteno mona de la mmembroj en tuta FRANĈIO. Tia laboro ni deziras subteni. Se ankaŭ por vi la kriterio de agado estas efikeco, subtenu nian skipon, usbtenu UFE kaj UEA.

E. Ludwig

P.S.- Ankaŭ ĉi-jare post la kongreso, mi kaptas la okazon danki al niaj amikoj, kiuj helpis nin per mondonacoj. Ili sciu, ke ni uzos tiun monon plj adekvate.

NI BONE KONGRESIS EN EPINAL... (20/21-ajn de aprilo)

La 44a Kongreso de la Kultura Orientfranca Esperanto-Federacio ariĝis la 20an kaj 21an de Aprilo 1985 en EPINAL (Vogezoj) kvardekon da partoprenantoj, inter kiuj troviĝis gastoj el Germanio kaj Luksemburgo. Dank'al la Epinal-a grupo, interalie S-ro DURAND, la kongreso bone disvolviĝis en la kongresejo "Vogeza Porinstruista Seminario". Tiu kongreso estis ĉefe labora kaj kultura.

I/ Labora kongreso :

Malfermis la kongreson nia organizinto de la kunveno, S-ano DURAND, kiu salutis ĉiujn ĉeestantojn. Poste, la Prezidanto, E. LUDWIG, bonvenigis la partoprenantojn kaj prezentis la agadraporton por tiu kongreso.

A/ Agad- kaj kas-raportoj :

La sekretario prezentis la agadraporton de la lasta jaro, ; konstatante la kreskon de la federacianoj kaj la sukcesojn de niaj staĝoj kaj insistante pri la plibonigo de la funkciado de la lokaj grupoj, kiuj devus labori por preciza celo.

La kasisto, prezentante la finanĉan raporton, atentigis la ĉeestantaron pri la deficito de nia bulteno "La Informilo".

Ambaŭ raportoj estis unuanime akceptitaj.

B/ Raportoj de la grupoj :

La partoprenantoj aŭskultis la agadojn en la diversaj E°-grupoj de nia Federacio, nome : BAR-LE-DUC, BRUYERE, EPINAL, MONTIGNY-LES-METZ, MULHOUSE, MUNSTER, NANCY, STRASBOURG kaj THIONVILLE.

C/ Raportoj pri la P.K.K., "La Informilo", la Libro-Servo :

- 1) La P.K.K. : S-ro COLNOT prezentis la nunan situacion :
 - Proksimume 20% de la lernantoj finis la elementan kurson.
 - Varbado : La Prezidanto insistis, ke ĉiu devu trovi novan lernanton por la PerKoresponda Kurso !.
- 2) La Informilo : S-ro DENIS, ĉefredaktoro de nia bulteno, atentigis pri la deficito de la eldonado, ĉefe ĉar la paperprezo rapide kreskis. Diversaj opinioj venis pri la solvigo de tiu deficito.
- 3) La Libro-Servo : La Libro-Servo, nuntempe fako de nia Federacio, bone funkcias kaj pligrandiĝas ; tio pruvas, ke ĝi estas bona kaj utila fako en nia Federacio.

D/ Decidoj :

Pri la estonteco de la Federacio :

- altiĝo de la abono al "La Informilo" por 1986 : 35 FF ;
- Elekto de du federacianoj por la kaskontrolo :
unuanime elektitaj S-ino ROUX kaj S-ro GILBERT ;
- Elekto de nova komitato kaj de nova estraro : vidu apartan paĝon.

E/ Nacia agado :

S-ino TRIOLLE, Sekretario de U.F.E., raportis pri la lasta nacia kongreso en ANGERS kaj lanĉis alvokon por prezenti planon al U.F.E. por la estontaj jaroj, prepare al la Univerŝala Kongreso en 1989 en PARIZO.
La venonta nacia kongreso okazos dum Pentekosto 1986 en GERARDMER (Vogezoj) en la "Maison de la Culture et des Loisirs". La Prezidanto de la L.K.K. estas S-ro CLAUDEL, la VicPrezidanto estas S-ro COLIN.

II/ Kultura kongreso :

Sabaton post la vespermanĝo, ĉiuj kongresanoj povis vidi la diapozitivon prezentadon de s-ano CLAUDEL : "La prahistorio de la Vogezanoj", kaj aliajn vidindaĵojn de la vogeza naturo. Sekvis teatraĵo : "La Somnambulo", prezentita de la loka grupo. Dimanĉe matene, S-ano Walther ZELAZNY, polo, prelegis pri "Analizo kaj tendencoj de la E°-movado".

Poste, okaze de la aperitivo ni havis la honoron akcepti S-ron SCHAEFFER, akademi-inspektoro reprezentantan S-ron BOUHIN, prefekto, honorprezidanto de nia kongreso, kaj S-ron COLLIGAN, direktoro de la "Vogeza Porinstruista Seminario", S-inon PERRIN adjunktino reprezentantan S-ron SEGUIN, deputito-urbestro, S-inon SIMONET, Prezidantino de "Epinal-Accueil" kaj F-inon TOUSSAINT, Intendantino de la Vogeza Porinstruista Seminario.

Krome, enestis la honorkomitato S-ro PONCELET, Prezidanto de la Departementa Konsilantaro, S-ro VOILQUIN, Prezidanto de la Departementa Komitato pri Turismo, S-ino LE CORVAISIER, eksprezidantino de la "Accueil des Villes de France" kaj S-ro BLUM, Direktoro de la Turisma Oficejo.

III/ Turisma kongreso :

Dimanĉe posttagmeze eblis viziti la Muzeon pri populara bildarto, la Galerion de la bildfarejo kaj la urbon EPINAL.

Por konkludi :

Nia ĉi-jara tasko estas la plibonigo de la lokaj grupoj kaj la ĉiama alvoko estas : "TROVU ALMENAŬ UNU LERNANTON AL LA P.K.K.°" por plue daŭrigi la kreskon de la federaciaĵoj kaj la progreson de E° !.

Protokolis la Federacia Sekretario: C. ROUX
la kongres-Sekretario: M. BASSO

KIEL LA KONGRESANOJ VOĈDONIS EN EPINAL
--

Jen la nova skipo de nia Orientfranca Kultura esperanto-Asocio:

Prezidanto: Sr° LUDWIG	Respondeculo pri la PKK°: Sr° COLNOT
Vic-prezidantoj: Sr° COLNOT, Sr° DENIS	Respondeculo pri "LA INFORMILO": Sr° DENIS
Sekretario: Fin° ROUX	Respondeculoj pri la "Libro-Servo":
Kasisto: Sr° GROSSMANN	Sr°j DEGRELLE kaj THIBIAS
Junulardelegito: Sr° BASSO	

Jen la tuta komitat-anaro

1 = Anne AMBLES	11, Rue des Ducs,	55000 BAR-le-DUC
2 = Michel BASSO	153, Rue Clémenceau	68000 WINTZENHEIM-COLMAR
3 = Jean-Louis CLAUDEL	"La Vieille Grange"	88600 BRUYERES
4 = Jean-Paul COLNOT	15, Rue de Lavaux	54520 LAXOU
5 = Philippe DAUTREVILLE	3, Rue des Narcisses	68400 RIEDISHEIM
6 = Roger DEGRELLE	BP 23	54510 TOMBLAINE
7 = Pol DENIS	5, Chemin de Blamecourt	55000 BAR-le-DUC
8 = André GROSSMANN	5, Rue des Pyrénées	68390 BALDERSHEIM
9 = René GUILLAUME *	Ecole Pasteur	54550 PONT-St-VINCENT
10 = Edmond LUDWIG	46, Route de la Schlucht	68140 STOSSWIHR-MUNSTER
11 = Catherine ROUX	9, Square A. Briand	54500 VANDOEUVRE
12 = Marthe NAU	6, Allée Marguerite	57158 MONTIGNY-lès-METZ
13 = Jean-Luc THIBIAS	37, Rue P. Curie	54500 VANDOEUVRE
14 = Bernard VIVIER	204, Rue de Ravenne	54240 JOEUF
15 = Bertrand WICK	2, Rue du Loess	67200 STRASBOURG

* elektita por unu jaro: anstataŭas Sin°n DE ZILAH

★

NIA PERKORESPONDA KURSO

Nia PPK° pli bone funkciis ol lastjare -ĝis nun 28 aliĝintoj... el 112 inform-petintoj, do 1 el 4... - Komence de aprilo mi dissendis cirkuleron al ĉiuj kunlaborantoj, petante samtempe freŝajn informojn pri la laboro de la diversaj gelernantoj. Statistiko starigita la 25an de majo pri 24 gelernantoj montras la jenon:

= 12 personoj (do la duono...) eĉ ne sendis 1 taskon!
 = 2 sendis po unu taskon, 1 sendis 2, 1 sendis 3 kaj 1 sendis 5. 7 personoj finlernis "M11", el ili 3 ĝis nun aliĝis al "M12", 1 eĉ finlernis "M12".

Tiuj, kiuj atingis la kursfinon estas:

- Sr° BARRIER, teknika instruisto en 68270 HOCHSTATT, gvidita de S-r° Grossmann, jam citita en la lasta INFORMILO, ĉar li ifnlernis M11 en malpli ol 2 monatoj, nun finlernis M12 post 2 pliaj monatoj. Gratulojn al li kaj al A. Grossmann!
- Sr° Gilles NULLENS, inĝeniero en ISPRA, Italio, gvidita de Sr° Etienne finlernis M11 en 3 monatoj kaj aliĝis al M12.
- Sin° Renée-France MARTINATO, instruistino pri beletro en 70300 LUXEUIL, gvidita de Sr° Colnot finlernis M11 en 3 monatoj kaj aliĝis al M12.

Krome ĵus atingis la finon de M11 sed ne havis tempon ĝis nun aliĝi al M12:

- Sr° Léon FILEE en REIMS, gvidita de Sr° Crochet, Sin° Isabelle ALLINCKX en Reims kaj Sr° Robert MELZI en 70110 BOREY, ambaŭ gviditaj de Sr° Greiner. Fine 4a lernantino de la pasinta jaro, S-in° Nadine FRANCOIS en 55170 ANCEVILLE, gvidita de Sr° etienne, atingis la finon de la NRK°.

Gratulojn al ĉiuj! ni esperas, ke post kelkaj monatoj la statisitkoj montras progreson en la nombro de la gelernantoj finlernantaj M11.



J.-P. Colnot

NIA VIVO EN...

THANN (68)

Dank' al la klopodoj de Gesinjoroj GROSSMANN el Mulhouse, la Internacia Lingvo Esperanto trovis sian lokon en la festo "VIVRE ENSEMBLE" de la Centre Socio-Culturel de THANN (68). Elmigrintoj el pluraj landoj prezentis sian patrujon. Jen ĝusta loko por esperanto, kiu ja rolas kiel ligilo inter la kulturoj.

Ce la esperanto-ekspozicio deĵoris Sinjoro GROSSMANN, disdonanta la unuan informilon de la "METODO 4" - "Votre premier rendez-vous avec la Langue Internationale"- kaj vendanta la verdan libreton "Une approche de la Langue Internationale". Helpis lin freŝbakita samideano el Hochstatt, Sinjoro Etienne BARRIER, ĵusa lerninto de nia perkoresponda kurso. Li ege talentas pri persvadado de interesiĝantoj!

Dum vizito de la senatano-urbestro, Sinjoro P. SCHIELE, evidentiĝis, ke esperanto estas jam konata fenomeno en Thann. Ankaŭ la estro de la loka liceo ege interesiĝis pri la afero.

E. Ludwig



NANCY (54)

La parola kurso kun 2 gelernantoj daŭre funkcias, gvidata de Catherine Roux. post finlernado de "M°11", la gelernantoj nun studas "M°12". La 2 dua-gradaj kursoj malpli bone funkcias = Tiu de la 18a30 startis kun 4 gelernantoj sed nur 2 daŭre lernas. = Tiu de la 20a30 jam en januaro ĉesis funkcii pro la malfavora vetero. poste nur 2 gelernantoj el 7 daŭre venis pli malpli regule ĝis la fino de aprilo. Pro okupiteco, preparo de ekzameno aŭ forvojaĝo ni decidis ne daŭrigi ĉi-printempe.

Kunvenoj okazis la 8an de marto kun 5 partoprenintoj (prezento de esperanto en scienco kaj tekniko, far J.-L. Thibias) kaj la 26an de aprilo kun denove 5 personoj. La 8a kaj lasta kunveno okazos la 14an de junio je la 20a30 por jam prepari la venontan laborsezono.



BAR-LE-DUC

Dum la tuta jaro kunvenis la klubo-membroj ĉiumonate. Konversaci-rondoj okazas regule cele perfektigon de la lingvokonoj.

La skipo aktive partoprenis la specifan eventon (tritagan!) enŝovitan en la urba karnaval-festego en marto, al kiu partoprenis gejunulaj el diversaj landoj.

La 24an de majo, 15 personoj renkontiĝis por amika plenaera vespermanĝo sub aparte favora nokto-vetero, ĉirkaŭ bongustaj gril-rostaĵoj kaj ekscita kampo-fajro!

Kvin membroj partoprenis la Internacian Semajnon de NICE kaj kvin jam aliĝis la Universalan Kongreson en AUGSBURGO. La klubo ĵus decidis gastigi polan pentristinon, Tamara ROSZAK, kiu prelegos tra Francio en oktobro. Ĝi ankaŭ kunlaboros en la kampanjo lanĉota de UFE dum la venonta lerno-jaro.

NOVA FRUKTODONA SARLANDA RENDEVUO

La 11/12ajn de majo 1985 ni partoprenis la 25an Kulturajn Semajnfinojn de SEL (Sar-landa Esperanto-Ligo) en HOMBURG. La interesege prelego de Claude GACOND pri la temo "Vivo kaj verkaro de Hector HODLER" vekis grandan atenton de la ĉeestantaro. Pere de pentraĵoj (la patro de Hodler estis fama pentristo en Svislando), lum-bildoj, libretoj, Claude GACOND prezentis al ni la malfacilan vivon de tiu amiko de Edmond PRIVAT. Kune ili organizis la 2an Universalan Kongreson en ĜENEVO (1906) kaj poste Hodler fondis U.E.A?-n en 1908. Liaj pacifistaj ideoj, inspiritaj de la "Deklaracio pri Homarĝismo" de Zamenhof kaj de la verkoj de Romain ROLLAND, helpis la fondiĝon de la LIGO DE NACIOJ kaj de la RUGA KRUCO, kie li multe influis.

Dankon al Claude Gacond pro la neforgeso de niaj pioniroj, ĉar 1987 estos ankaŭ la centjara naskiĝdatreveno de Hector Hodler!

Anoj de la NANCIA GRUPO

FRANC-GERMANA AMIKECO SUPER LA LANDLIMO!

En la fino de marto la bela baroka urbo RASTATT (Germanio) sukcese alvenigis 130 esperantistojn el Germanio, Francio kaj el aliaj landoj, tio dank' al la bonega organizado de tiu renkontiĝo en la agrabla Dioceza Klerigdomo "Sankta Bernardo" far la loka E°-Grupo kaj sia estro S-r° FISCHER.

La oficiala malfermo okazis vendredon vespere per salutvortoj de S-in° WINDISCH, prezidanto de Baden-Virtenberga E°-Ligo (BAVELO...), de S-r° H. Fischer la organizanto kaj de S-r° Ludwig prezidanto de nia Federacio. La ĉefurbestro de Rastatt, S-r° Rothenbiller, ĝojis, ke tiu renkontiĝo okazis en lia urbo, kie oni serioze lernas la najbaran lingvon -Rastatt situas je 7 km°j de la franca limo- sed li deklaris: "*Via lingvo estas pli grava kaj pli ampleksa afero!*" Sekvis prezento de germanaj popoldancoj, koncerto kaj fine Germanoj kaj Francoj kune kantis en esperanto akompanataj per piano. Sabaton matene post la Ekumena Di-laŭdo en la kapelo de la Klerigdomo celebrita de pastro Eichkorn kaj pastoro Lipps la eksterregionaj loĝantaj partoprenis urbgvidadon dum en la kongresejo okazis grava BAVELO-jar-ĉef-kunveno. Sub brila suno fariĝis posttagmeze la ekskurso, kiu kondukis la gastojn en Nigra Arbaro kaj al la mondkonata banloko Baden-Baden. Vespere amuzigis la franca kanzonisto Jak Le Puil la ĉeestantojn per esperantaj kantoj. Palmodimanĉon estiĝis diservoj en la katolika kaj en la protestanta preĝejoj kaj, en la kongresejo, S-r° MID prezentis Augsburg kaj raportis pri la stato de la preparo de la ĉi-jara Universala Kongreso. La kunsidoj de la fak-grupoj -Instruistoj, Naturamikoj, Katolikoj kaj Junuloj- okazis post la tagmanĝo. Kvarono de la partoprenantoj al tiu renkontiĝo estis gejunuloj do ili grandparte havis interesan propran programon (vidu artikolon en la "junulara paĝo").

Tiu renkontiĝo estis do granda sukceso kaj pruvigis la gravecon de la Internacia Lingvo, kiu bone taŭgas inter Germanoj kaj Francoj.

Michel BASSO

NOTO DE LA REDAKTORO: aldonende al tiu raporto atingis nin la ĉi-suba letero de Familio FISCHER...

"... Apartan kaj varman dankon al Michel BASSO, kiu venis trajne kaj bicikle jam vendredon matene por helpi. Li helpis ĝisfine. Kiam li hejmenbiciklis, nia Badenlanda vetero-dio dankis laŭ sia maniero... sendis pluvon kaj malsekigis lin ĝishaŭte! Ni esperas, ke tamen Michel kunportis bonan impreson kaj havos agrablan rememoron al la Franc-germana Esperanto-Renkontiĝo en Rastatt."

Familio Horst FISCHER

MALFERMITA PET-LETERO...

Estimataj Gesamideanoj,

Ĉiu-jare multaj eksterlandaj esperantistoj venas turizmi en Francujo, kaj ankoraŭ pli multaj venos, se post kelkaj jaroj okazos Universala Kongreso en Parizo. Ĝis nun ni ne povis disponigi al ili praktikan gvidlibron en Esperanto, kiu donus la necesajn turismajn scindaĵojn.

Pro tio U.F.E. planas eldoni facile manipuleblan kaj aktualigeblan gvidlibron, sub formo de sliparo. Sur ĉiu slipo estus priskribitaj urbo kaj ties ĉirkaŭaĵo, kaj la bazaj praktikaj informoj, kiujn bezonas vojaĝanta esperantisto.

Por tiu-ĉi laboro via kunlaboro estas nepre necesa, ĉar evidente la plej fidindaj informoj venas de la surlokuloj mem. Ni ĝatus ricevi sub formo de 1 ĝis 3 tajpitaj paĝoj la jenajn informojn:

- = Nomo de la vilaĝo aŭ urbo, departemento, situo en la regiono aŭ kompare kun pli konataj lokoj
- = Nomo de la vilaĝo aŭ urbo, departemento, situo en la regiono aŭ kompare kun pli konataj lokoj.
- = Nombro de enloĝantoj; alteco; atingebleco per diversaj vetur-rimedo; ĝemelaj urboj.
- = Historio de la loko: ĉefaj eventoj sciendaj.
- = Vizitindaĵoj (kun precizigoj, kiel atingi ilin).
- = Elstaraj eventoj de la jaro (ekz. foiroj, karnavalo, festivalo...).
- = Gastronomiaĵoj.
- = Restadejoj (eble malmultekostaj hoteloj, sed specife tiuj eblecoj, kiuj ne aperas en tradiciaj gvidlibroj: junulardomoj, gruprestadejoj, naturamikaj domoj k.s., tendumejoj...).
- = Adreso de la Turism-Oficejo; ĉu ekzistas esperant-lingva informilo pri la loko?
- = Specifaj esperantistaj praktikaj (UEA-delegitoj, Pasporta Servo -jes aŭ ne-, sidejo de la grupo, horaroj de la kunvenoj, aliaj faciligoj por esperantistoj, ktp).
- = Estus krome bonvenaj: indiko pri la prononco de la nomoj; mapeto de la loko, eventuale de la ĉirkaŭaĵoj, kaj kompreneble aliaj rimarkoj kaj ideoj viaj.

Tio, kio specife interesas nin, estas ĝuste tiuj informoj, kiujn lokulo scias, kaj kiun preterpasanto kutime bedaŭrinde pretervidas, havante nur la oficialajn informilojn.

Ni tre esperas, ke vi havos la eblecon helpi nin, kaj ni antaŭdankas vin multe pro via kunlaboro.

Plej korajn salutojn, S-in° Claude NOURMONT

2, Om Kläppchen,
L-5682 DALHEIM

Luksemburgio

karaj junaj geamikoj

MEMORINDA DU-LANDA SEMAJNFINO!

La franc-germana renkontiĝo en RASTATT (29/31-3/1985) ankaŭ arigis proksimume 30 gejunulojn el 6 nacioj. Ni povis partopreni propran programon, kiu estis tre interesa. Tuj post la malfermo ni ekzercis kun la grupo "SCREIBER-JUGEND" de Rastatt germanajn popoldancojn.

La bela vetero de sabato permesis al ni la viziton de la urbo kaj ties junulardomo, kie ni kune diskutis pri la generaciaj problemoj inter plenkreskuloj kaj gejunuloj, plue problemoj de la infanoj de eksterlandaj laboristoj. La ofertitaj trinkaĵoj estis ankaŭ tre ŝataj. Posttagmeze, per brile novaj bicikloj prunteprenitaj for la stacidomo ni ekskursis al la belega palaco "Favorite" iomete ekster la urbo. Dimanĉon ni lude ekkonis la urbon. Kvinope, helpe de fotoeltondaĵoj, ni devis trovi 7 literojn fiksitajn sur urbaj monumentoj. La solva vorto de tiu "piedira ralio" estis "RASTATO".

Poste, okaze de la fakkunvenoj, la junularo de la Baden-Virtenberga lando oficiale fondis "BAVEL-ido"n (Junulara Sekcio de BAVELO), kio estos certe bona antaŭenpaŝo por nia loka movado, precipe en nia internacia Jaro de la Junularo. Oni elektis interalie F-in^ojn Christine BILHARDT kiel prezidanton kaj Simone FISCHER kiel zorganton de la rilatoj inter Bavel-ido kaj Francio. Raportis pri tiu fondkunveno raportisto de la loka radio-stacio "Sudwestfunk".

Post tiu sukcesa junulara renkontiĝo mi esperas, ke la Francoj kaj la Germanoj pli bone kunlaboros pere de esperanto.

Michel BASSO

NI BONEGE KARNAVALUMIS!

De la 22a ĝis la 24a de marto, okazis en BAR-le-DUC la ĉiujara Karnavalo. Partoprenis multaj esperantistaj eksterlandanoj, venintaj el Kanado, Germanujo, Belgio kaj Sovetio. La interkonatiĝo komenciĝis vendrede vespere kaj la etoso varmiĝis dank' al popolaj dancoj, ludoj kaj akordionaj muzikoj. Afablaj najbaroj gastigis la gejunulojn por tranokti. Sabate, post la kostum-preparado, la grupo vagadis kante kaj dance tra la urbo. Bonvolemaj komercistoj, pro la komuna ŝajna malsato, donacis bonegajn biskvitojn. Post la kvietigo de ĉies stomakoj, la grupo revenis al la "malnova urbo", kie troviĝas la kunvenejo por iomete refortiĝi por la vespera kostumbalo. Post freneza nokto kaj meritita ripozo, dimanĉe matene ĉiuj trankviliĝis per aŭskultado de esperantaj kantoj, kaj babilis. Posttagmeze okazis la Karnavala procesio kun ĉiuj loĝantoj de Bar-le-Duc.

Malfeliĉe, ĉio bona devas finiĝi.... Ĝis venontjare!


Valérie BONMARCHAND
Patricia MOULIN
Patricia PROVIN

*

"LUMO"-LUDO... POR RAPIDA LAŬTLEGADO... *Olga DU TEMPLE (Kanado) legis la tuton dum 105 sekundoj... la redaktoro de LA INFORMILO bezonis 85 sekundojn (legado registrita sur kasedo por kontrolo!)... se vi sukcesas laŭtlegi pli rapide, sendu al ni vian nomon kaj tempon konkurŝan.* (Ne forgesu bone akcenti!)

Al alta arbara abatejo alpaŝas la anaso
Bebo babilas bobele
Celante certecon, li, sciante ceterajn cirkonstancojn, cedis
Ĉiam la ĉielo ĉarmas ĉiujn
Do, didaktitema didelfo sin dediĉas al dorna dogmo
Ermita elefanto evitas evidentajn erarojn
Fabla fiŝo faras fantaziajn fanfarojn
Guma gudro gluas genuojn de generaloj
Ĝemelaj ĝirafoj ĝenerale ĝuas ĝentilan ĝojon
Hirta histriko hurlas hoboje
Ĥameleonoj en ĥitonoj ĥaose ĥoras ĥorale
Iam, iel, ia insida infano iom insulte kaj ironie imitis ilin
Jes ja, jam la jaro januaras
Ĵusa ĵurnalo ĵuras ĵargone ke ĵudisto ĵaze ĵonglas en ĵipo
Knabo kolektas kokajn koksojn
Lundon la larma luno lulis lekantojn kaj liliojn
Momente morgaŭ la mondo muĝos mistere
Neniam necesas nutri naciojn najbarajn nukle-bombe
Obstinaj oficiroj observas ornamitajn orajn ovojn ostracisme
Purpura papilio palpebrumas palpate
Ronde kaj ronde rulis la radoj. Ronkante ripozis la reĝo

Serioze kaj solene en la selo sidis la skeleto
Ŝajne ŝanco ŝanĝas ŝablonojn
Tamen tempo tenas tiaman tiklan tigron
Ume umu per uma umilo
Urba urso unikas universitate
Varma vanta vampiro venas vane
Volonte Volapukano vokas vin vclupte
Zitero zumas zorge
Zebro zigzagas zenite



Malgraŭ aĉa vetero (blanka neĝo kaj pluvo) ĉirkaŭ 80 esperantistoj el la tuta Francio, el Britio, germanio kaj Nederlando retroviĝis en Mesnil-St-Père okaze de la 4a Sejna Ren-
devuo, la 16/17ajn de marto 1985. Sed kia aro da eminentuloj! Ŝajnas al mi malfacile citi
ĉiujn nomojn: S-r°j WARINGHIEN, BERNARD, THIERRY, LAGRANGE, GACOND, PIRON... Ekde vandre-
de vespere, partoprenintoj el la 69a U.K.° prezentis al ni siajn filmojn kaj lumbildojn
pri bela vojaĝo al Kanada.

,Sabate posttagmeze, okazis emociplena momento. Post parolado de estrarano de F.O.L.
("Fédération des Oeuvres Laïques") kaj de Giorgio SILFER, estis inaŭgurita memortabelo
omaĝe al Yvonne MARTINOT, kiu forpasis la 5an de januaro. Dank' al ŝi, la "rendevuoj" de
L.F.-Koop povas funkcii bone en sia propra domo, kiun ŝi donacis al F.O.L.

Tuj poste komenciĝis la kursoj. Perla MARTINELLI gvidis kurson por komencantoj, Mar-
celle TURIN zorgis pri progresantoj, uzante "METODON 12". Aliflanke, G. SILFER esploris
profunde gramatikajn problemojn de la Internacia Lingvo.

Sed la pinto de la Rendevuo estis la prelego de Claude PIRON, alinome "Johan VALANO",
pri sia verkaro, la fama serio "Ĉu...?" (detektiv-romanoj). Fakte li parolis multe pli
pri lingvistiko kaj stilistiko ol pri la enhavo mem de siaj romanoj. Tiel li pledis por
pli da libereco en la vortfarado kaj en la esperanto-stilo, emfazante, ke E° estas la
plej demokrata lingvo en la mondo malgraŭ la rigoreco de la Zamenhofa Fundamento.

Sabate vespere, li regalis nin per siaj agrablaj knazonoj, kelkaj novaj, kelkaj malno-
vaj (troveblaj en la kasedo "Frandu Piron...") kaj Sr° BERNARD kaptis la okazon por de-
klami kelkajn el siaj poemoj (aranĝitaj muzike de Johan VALANO).

La Rendevuo finiĝis per prelego de Claude GACOND pri la temo: "ESPERANTO fronte al sia
jubileo".

Ni estas ege dankemaj al la tuta grupo de TROYES, aparte al Suzanne BOURROT, kiu, mal-
graŭ malfavoraj meteologiaj cirkonstancoj, ĉiam gaje zorgis pri la bona organizado de ĉio.
Do, ek al la 5a rendevuo!

Catherine ROUX

*
PRIPENSU, PROONU, REAGU!... JEN KELKAJ EL LA PROPONITAJ SLOGANOJ POR PAGITA ANONCO EN
GAZETO. SKRIBU AL Bernard LEGER, 35, Rue V. Mussault, 94120 FONTENAY

Ne soyez pas bridés dans vos échanges
Pour moi, le chinois... c'est de l'espéranto!
Ne chinoisez plus, espérez-vous!
Et si on chinait ensemble?
Et moi je comprends le chinois...
Espéranto chic... Espéranto choc... Espéranto chin-toc!
Démarquez-vous... Apprenez la deuxième langue!
La seule langue qu'on n'apprend pas dans le pays
Une langue venue d'ailleurs...
E...? Evasion...? Echanges...? ESPÉRANTO!
Le TGV pour apprendre les langues!
En-chinez-vous avec nous!
Pas besoin d'un long cours pour voyager au long cours...
Valorisez vos vacances... votre argent vaudra 13% de plus!
Vous voyagez?... J'en suis fort aise... Eh bien, parlons maintenant!

Jes!... mi tuj venos... sed mi
unue devas sciigi al ili, ke
mia baldaŭa aventuraro* iom mal-
fruos... Ĉu ili notos?...



* temas pri
la "Sekreto de la
UNUKORNULO", kies eldonado
estas kelkmonate prokrastita.

*ne forgesu scindi baldaŭ
vian labipilon al la
22a skizo de "parolata E°"!*

*

ANIAJ PRA-AVOJ ESPERANTISTAJ...

Grava estas la demando: ĉu transporto de esperanta libroŝranko estas fruktodona laboro? Vi eble opinios ke ne! Tiam, vi ne pravos. Ĉar tia transporto estas utiliga, kiam oni rimarkas, ke en la ŝranko estas trezoro! "Kia trezoro?" vi tuj demandos... "Ĉu oro, juvelo, diamento, gajnanta bileto de sporta loto?"... Ne, sed la libro de la asembleoj de la esperanto-grupo de Nancio, de 1904 ĝis 1911. Ne malmiru! Tiu libreto estas ja trezoro, ĉar ĝi alportas multajn netakseblajn sciigojn pri niaj prauloj!

Kiam mi legis tiun libreton -pli ekzakte tiun kajeron, kie estas mane registritaj la debatoj de la nancia grupo dum ĝiaj jaraj aŭ eksterordinaraj asembleoj- mia unua penso estis peti de Sinjoro CLAUDEL lian * *tempo-maŝinon* por iri al *NANCIO de la komencanta XXa jarcento*, tien vidi nek *daruojn*, nek *birdohomojn* sed la nanciajn esperantistojn de la pionira epoko... kaj sonregistri iliajn tutajn debatojn.

Sed mi rimarkis, ke la raportoj estas skribitaj franclingve. Do sendube ankau la debatoj tiel estis, kaj eble ne ĉiuj esperantistoj povus bone kompreni ilin. Do mi decidis pli tradicie agadi kaj traserĉi en la skribitaj raportoj la plej notindan (la tuta reskribo de la kajero estus eble tro laciga por la leganto kaj sendube tro multekosta por "LA INFORMILO"!).

La raportoj estas faritaj de tri sinsekvaj sekretarioj: Sinjoroj MARESQUELLE, NIEGER kaj (eble) THIAUCOURT. Unua konstato: tiamaj samideanoj ne skribis pli bele ol ni... la skribaĵoj de la tria sekretario ne estas pli legebla ol tiuj de la fondinto de la libroservo (?!).

Ĉu la regionaj prauloj multe malsimilis al ni? Ne vere, kvankam estas kelkaj diferencoj:

= Unue, temas pri GRUPO DE NANCIO, ne pri NORD-ORIENTA FEDERACIO. Tiu-ĉi iel ne povis ekzisti same kiel hodiau, ĉar tiam la tri departementoj BAS-RHIN, HAUT-RHIN kaj MOSELLE estis ankoraŭ kontraŭvola parto de la germana imperio.

= La kunvenoj ne okazis en iu Junul-Domo (ĉu Philippe Desgorges jam estis naskiĝinta?). La lokoj menciitaj estas la 24, *rue des Carmes*, la *Scienca Fakultato (rue de Serre)*, la *Amfiteatro de Matematikoj (place Carnot)* aŭ la *Komerco-Domo*.

= Strangaj ŝajnas al ni hodiaŭ kelkaj monaj aferoj: la komerco-domo montras sian intereson pri la grupo per subvencio de 100 frankoj... (klarigo: 100 tiamaj frankoj estas unu nova franko aŭ 10 000 malnovaj centimoj sed certe multe pli valoras ol cent nunaj frankoj!).

= Ankoraŭ pli malkredebla: En 1904 la grupo decidis... malpliigi la kotizojn: 5F anstataŭ 6 por la membroj aktivaj, 6 anstataŭ 10 por la ... bonfaraj! Tia strangaĵo tamen estis baldaŭ "korektita": kvar jaroj poste, rimarkante, ke la asocio ne plu disponas sufiĉe da mono, oni realtigas la kotizojn ĝis la antaŭa prezo!

Dezirante plibonigi la financon staton, la kasisto proponas en 1905 rimedon, kies formulado ŝajnas al ni konata: "...Necesas varbi por la grupo la plej eble multe da aliĝantoj...". Tamen la fama slogano... "Ĉiu federaciano malkovru almenaŭ unu novan membron ĉiujare..." ankoraŭ ne estis uzita!

Ĉu la tiamaj esperantistoj estis ĉiuj pli fidelaj ol nuntempe? Ŝajnas ke ne: en 1904 kunvenis 25 membroj; en 1911 nur 17. Kaj rimarkinte, ke la 6 membroj de la komitato ne povis pro diversaj kialoj fariĝi ĉiuj aktivaj esperantistoj, oni decidis aldoni en 1905... 6 aliajn komitatanojn.

Finfine la komitato havas 12 membrojn elektitajn por tri jaroj, triono estante anstataŭigita ĉiun jaron (sendube pro manko da volontuloj, ĉiuj komitatanoj estis unuanime -re-elaktitaj).

J.-L. THIBIAS (sekvota)

* noto de la redaktoro: aludo al la intereso-plena diapo-prezentado far Sr° Claudel dum la federacia kongreso en EPINAL.

*


BONVENON AL S-R° BORSBOOM, KIU GVIDOS LA ALTGRADAN KURSON DE NIA 22A STAĜO.

Ed. BORSBOOM, naskiĝis la 14an de majo 1936 en HAGO (Nederlando), lernis esperanton en la gimnazia tempo. Aktiva membro de T.E.J.O. (Tutmonda Esperantista Junular-Organizado), li redaktis "TRUMPETO-n", la gazeton por junaj esperantistaj nederlandanoj kaj organizis la TEJO-Kongreson en ROTERDAMO en 1960. En tiu periodo li laboris, dum liberaj horoj, kiel sekretario de Andreo CSEH (la fama verkisto de la rekta metodo por instruado de esperanto).

Aperis la de li tradukitaj libroj: 1967: "FAKTOJ PRI NEDERLANDO"
1968: "NEDERLANDO, Nacio en Okcidenta Eŭropo"
1976: S.A.T. (Sennacieca Asocio Tutmonda) publikigas lian "VIVO-n de LANTI", biografio de unu el la fondintoj de SAT

1981: Fondiĝo de la Societo Andreo CSEH, por kiu li editoris la artikolserion "Vortoj de Andreo CSEH"
Nuntempaj laboroj: partoprenas en la laboroj de la revuo LITERATURA FOIRO kaj de la E°-Centro E. PRIVAT en LA-CHAUX-DE-FONDS (Svislando)

Profesie li instruas germanistikon en la "Supera Teknika Instituto" en UTRECHT (NL)






distra angelo



KRUCVORTENIGMO



HORIZONTALE

1 Papajarbo - blua floro (R). 2 Seninteresa - por gvidi-pronomo. 3 Sanĝi direkton (R) - sufikso (R) - adjektivo. 4 Muzika verko - insulo (R). 5 Kiu plaĉas - etendaĵo de akvo (R) - gumrezino. 6 Graminaco el seka tero (R) - malgladi - por fari ion - la sama (R). 7 Remaĉulo (R) - sciiga. 8 En oblikva linio - nek patra, nek patrino - sufikso. 9 Venena herbo (R) - alpa kapro. 10 Por meti ion - por fari brosojn. 11 Dio (R) - herbo el ŝtonĝardeno - ie.

VERTIKALE

1 Unu el la du ruĝaj - branĉoj kaj folioj (R) - konjunkcio. 2 Barometro (R) - por skribi. 3 Ruĝe flava - kiu havas grandan influon - prepozicio. 4 Adverbo - el elemento de armeo. 5 Malproksime naskita (R) - pro ia kaŭzo - teksaĵo (R). 6 Orcino (R) - fibro por fari ligilojn - pronomo. 7 Fari senvoĉa - centra parto de rado. 8 Lingvo (R) - filo (R) - pasado al vigla stato. 9 Nek akuta, nek obtuza - koksosto (R) - prepozicio. 10 Zonerupcio - ujo. 11 Mamulo - sinsekvo de vokaloj - malgranda kubo. 12 Pro tio - maljuna - loko.

SILABENIGMO

Pere de la ĉi-subaj alfabele ordigitaj "silaboj" malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La unua kaj tria kolumnoj, vertikale legataj, elformos proverbon.

ab an apo ar ark cio co ĉe ĉer da di di do ed ef ek el eno eo fa go ila keo la laŭ lo lo lo na no ono or pen pi ro san so sti sus ta tri ul ut

1	+ - + - -	hejma servisto
2	+ - + - -	jara gesto necesa
3	+ - + -	malnova mezur unuo
4	+ - + - - -	punkto de la ĉiela sfero
5	+ - + - -	E ^o ja estas!
6	+ - + - - - -	tute elpreni ion
7	+ - +	fino de erupcio
8	+ - + -	regula interarangĝo
9	+ - + - - -	forta impresio farita de io
10	+ - + - - - -	piedvesto
11	+ - + - -	birdofajfado
12	+ - + - - -	ne ŝatata besteto
13	+ - + - - - - -	filmo-momento
14	+ - + - -	esprimi aprobon
15	+ - + - -	nordpolusa
16	+ - + -	nekompleta riĉeco
17	+ - + - -	fabela ĝardeno
18	+ - + - -	sin deteni de nutraĵo
19	+ - + - - - -	proza fablo

MONATO

internacia magazino sendependa

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj
esperanto-revuoj

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materiaĵon de:

MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ (N° 49)

KRUCVORTENIGMO = kruckolora ul uesto focen ne danaa ir intuo ro eskud maiz ileks
rokoko lilio serv ru taelo lar ergo skovelo lui urtik utriklo obio
urio dual tondro et olda

SILABENIGMO = "serponton oni povas eviti sed kalumnion neniam".

imprimé par l'AGENCE TECHNIQUE DES ASSOCIATIONS, 12, Rue VOLTAIRE, 55000 BAR-le-DUC.

Le rédacteur: Pol DENIS - Le directeur de la publication: Jean-Paul COLNOT - dépôt légal n° 245 -
inscription à la CPPAP sous le n° 62887.